

# Denove atismo kaj itismo

Geraldo Mattos

Renato agis, Bertilo reagis kaj nun mi rereagas. Mi faros mallongan kritikon de la instruoj de lia reaganta referato, kaj liaj grasaj titoloj konduku min al bona haveno.

Mi tamen unue pravigos la titolon, kiu supras miajn vortojn.

Efektive en Esperanto kaj verboj kaj participoj estas tempaj vortoj, sed ĉiu el ili havas apartan deirpunkton:

Verboj apogas sin sur la tempo de la parolo. Ilia deirpunkto estas la momento, kiam la diranto parolas ion, kies okaziĝo estas datata per lia tempo:

Pasinteco	-is	antaŭ la parolo
Estanteco	-as	dum la parolo
Venonteco	-os	post la parolo

Participoj apogas sin sur la tempo de la fakto, kiun la verba radiko aŭ la verba radikalo transsendas al la dua dialoganto. Ilia deirpunkto estas la momento, en kiu la okazaĵo disvolviĝas:

Pasinteco	-inta / -ita	post ol la fakto okazas, okazis aŭ okazos
Estanteco	-anta / -ata	dum la fakto okazas, okazis aŭ okazos
Venonteco	-onta / -ota	antaŭ ol la fakto okazas, okazis aŭ okazos

De tio, ke la participoj en sia plej uzata formo estas adjektivoj, ilia difino egalas al tiuj de la ordinaraj adjektivoj, kiuj estas tute indiferentaj por la tempoj de la parolo: pasinteco, estantecon kaj venonteco. Participoj kaj adjektivoj: havas do nur la tri tempojn de la fakto [mia difino]:

Bela: kiu plaĉas, plaĉis aŭ plaĉos pro sia formo aŭ ecoj - *lia bela fratino estas graveda / la bela Helena el Trojo estis reĝino / lia bela filino estos mia edzino.*

Pro klaraj ŝparmotivoj vortaroj difinas nur por la estanta momento, sed per vortoj, kiuj estas indiferentaj por la tempoj de la parolo. PIV [Paris: SAT, 2002. p. 148] komencas sian difinon ĉi tiele:

**bel/a. [...]** 1 Vekanta [...]. 2 Vekanta [...]. 3 Donanta [...]

Evidenta intenco: ... kiu estas, estis aŭ estos -anta.

Sekve de tio la sekvantaj frazoj de la paragrafo 25:1-3 de la Ekzercaro prezentas respektive estantecon, pasintecon kaj venontecon de la dirado, sed solan kaj nuran estantecon de la participoj:

Mi estas amata. Mi estis amata. Mi estos amata.

La sekvantaj frazoj de la paragrafo 25:7-9 de la Ekzercaro prezentas respektive estantecon, pasintecon kaj venontecon de la dirado, sed solan kaj nuran pasintecon de la participoj:

Vi estas lavita. Vi estis lavita. Vi estos lavita.

La sekvantaj frazoj de la paragrafo 25:13-15 de la Ekzercaro prezentas respektive estantecon, pasintecon kaj venontecon de la dirado, sed solan kaj nuran venontecon de la participoj:

Li estas invitota. Li estis invitota. Li estos invitota

Mi sentas min devigita laŭdi kaj aplaŭdi la elekton de la verboj de tiu paragrafo: ami gravas per sia estantecon, vesti valoras per sia estinteco kaj inviti nobeligas per sia estonteco! Vere saĝa elekto!

Kaj ni ne forgesu, ke plej multaj neparticipaj adjektivoj indikas la estantecon de la fakto [bela / alta / feliĉa / pura: dumaj adjektivoj], kelkaj la pasintecon de la fakto [preta / morta: antaŭaj adjektivoj] kaj rarismaj la venontecon de la fakto [kaduka: postaj adjektivoj].

## Ĉu dua vivo por tempismo?

Kiel multaj aliaj, ankaŭ Bertilo opinias, ke la problemo pri la finaĵoj -ata kaj -ita okazas ene de la pasivaj esprimoj, sed la doloriga fakto estas tio, ke la vera problemo kuŝas en la senco de la participoj kaj iliaj mistraktoj ene de la pasivo estas simpla rezulto de ĝia nescio.

Estas grave konscii, ke niaj korifeoj ne multon sciis pri la senco de niaj participoj, kaj ili do ne iris, sed nur rampis al nekonata lando. Tio pravigas la barbarajon, kiun ni povas legi sur la paĝo 55 de Vojaĝo inter la tempoj [La Laguna: Stafeto, 1966], verkita de Kalocsay:

... ĉe pozitiva signifo "lunde havita mono" estas mono, kiu lunde estis havata, kaj, ĉar marde ĝi ne estis plu havata, ĝi perdiĝis intertempe, ekzemple per nokta kartludo. Ĉe negativa signifo "lunde havita mono" estas mono, kiu jam lunde ne estis plu havata, do perdiĝis iam antaŭe.

Mi argumentas per redukto al absurdo: ... ĉe pozitiva signifo "lunde loĝinta homo" estas homo, kiu lunde estis loĝanta, kaj, ĉar marde li ne estis plu loĝanta, li translokiĝis...

Mi tamen opinias, ke li ne konis la francan spite de lia granda amikeco kun Waringhien, ĉar la Franca Gramatiko de la Fundamento portas bedaŭrinde kaŝitan instruon pri la participoj en la 6-a regulo:

Le passé, par is: vi faris – vous faisiez, vous avez fait.

El tio ni rajtas dedukti:

travail que vous faisiez [laboro, kiun vi faris]:      laboro farata  
travail que vous avez fait [laboro, kiun vi faris]::      laboro farita

Sekve de tio, lia frazo en la sama paĝo estas orfa, ĉar mankas al ĝi unu el la sencoj de la Esperanta verboformo -is, kiun mi enmetas inter rektaj krampoj:

[havata= kiun oni havis]  
havita = kiun oni havis

Kalocsay devus memoriĝi al si, ke dusenca estas nur la estinta verboformo, ne la participoj. Zamenhof certe pensis pri ni ĉiuj, kiam li lasis dufoje averton pri la estintaj participoj, kiuj estas unusencaj, kvankam devenantaj de dusenca verboformo:

Mono havata estas pli grava ol havita.  
Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota.

La supraj frazoj kaŝas delikatan instruon: en la du okazoj, la senco estas egala [post la havo / post la kapto], sed la inferencoj estas aliaj pro tio, ke la unua estas statoverbo, kies fino estas simpla neo de la stato [ne plu havata], dum la dua estas agoverbo, kies fino lasas valoran rezulton [io apartenas al la kaptinto].

### **Kio entute estas la -ata/-ita-problemo?**

Bertilo diras:

La Gramatiko donas nur du efektivajn ekzemplojn de pasivaj frazoj:

- *Ŝi estas amata de ĉiuj.*
- *La pordo estas fermita.*

La dua ekzemplo ja ne temas pri pasivo, sed pri simpla adjektivo, kaj la verbo ne estas tie kopulo, sed simpla netransira verbo. Spite de la nepasiveco de la dua, ili estas gravas pro la subtila iĵndiko, ke *ami* estas statoverbo, kiu prikvilegias la estantecon, kaj fermi agoverbo, kiu privilegias la estintecon, nome la rezulton.

Ĉe alia nedeverba adjektivo la senco de la dua verbo restus la sama:

La pordo estas fermita [la pordo sin trovas fermita].  
La pordo estas pura [la pordo sin trovas pura].

Neniu el tiuj du frazoj respondas al ia aktiva verboformo...

Kaptas min sento de manko, kiam mi konstatas, ke la dua frazo de la Ekzercaro aperas sole nur en la Franca Gramatiko. Tia frazo, aperanta en la germana, kondukus la atistojn al la rekono, ke la preterito de la kopulo kun estinta participo de agoverboj estas dusenca esprimo:

1. Pasivo, kiu respondas al la simpla aktiva preterito:  
Die Tür wurde geschlossen [la pordo estis fermita: oni ĝin fermis].

2. Predikativa frazo sen kopulo:  
Die Tür ist geschlossen [la pordo estis fermita: oni trovis ĝin fermita].

Al la sola esprimo de Esperanto kaj al la du de la germana respondas kvar en la portugala:

era fechada / foi fechada / estava fechada / esteve fechada... Pro mia Deino!

Esperanto do neglektas la estantecon kaj la estintecon de la preterito, kies distingo dependas de la kunteksto.

## Du skoloj

Bertilo diras:

<b>Aktive</b>	<i>Grenado vundis lin en la dua mondmilito.</i>
<b>Pasive</b>	<b>itisme:</b> <i>Li estis vundita de grenado en la dua mondmilito.</i>
	<b>atisme:</b> <i>Li estis vundata de grenado en la dua mondmilito.</i>

Ĉi tie la atismo eraras malbele, ĉar ĝiaj uzantoj ne atentis pri eta rimarko en la 6-a paragrafo de la Fundamenta Gramatiko, ordinare neglektata precipe de la atistoj, kiuj uzas la estantan partupon por indiki la simplan pasintecon de fakto:

*Ŝi estas amata de ĉiuj* – elle est aimée de tous (part. prés.: la chose se fait).  
Mia interpreto: (estanta partupon: la stato daŭras).

Krom tiu grajnero, alia informo de la sama paragrafo leĝe kaj reĝe permesas al ni kompletigi la tekston inter krampoj, ĉar ĝi verdiktas dusenca la finaĵon -is per la traduko en la Franca Fundamenta Gramatiko:

... (part. prés.: la chose se fait, la chose se faisait).

Se tio validas por estanteco kaj estinteco, evidente validas ankaŭ por estonteco, kaj do ni vere povas fini la regulon pri -ata kaj egale pri esti -ata:

... (part. prés.: la chose se fait, la chose se faisait, la chose sera en train de se faire).

La atistoj pretervidis tiujn grajnerojn, kiuj konfirmas, ke -ata en estanteco kaj en estinteco indikas la fakton, kiu okazas, post komenco, sed sen fino, kaj analoge tio validas ankaŭ por estonteco: en mia vortumo, duma fakto. La koncerna aktiva formo klare parolas pri ago jam finita, ĉar la verbo *vundi* trudas ideon pri momenta ago. Se la diranto volus insisti pri ripeto, io devus esti aldonata.

La atisma vortumo tamen parolas pri ago ne finita, se ni apogas nin sur la kunplekto de la informoj de la verba regulo en la Fundamento:

vundata: dum la vundo okazas, okazis, okazos.

vundita: post ol la vundo okazas, okazis, okazos.

Bertilo plu diras:

Tute simile en estonteco:

<b>Aktive</b>	<i>Post unu jaro oni vendos la domon.</i>
<b>Pasive</b>	<b>Itisme:</b> <i>Post unu jaro la domo estos vendita.</i>
	<b>Atisme:</b> <i>Post unu jaro la domo estos vendata.</i>

Kaj nun ĉi tie la itismo eraras malgracie, ĉar ĝiaj uzantoj ne atentis pri eta rimarko, kiu estas vera en ĉiu kunteksto:

*La pordo estas fermita* – la porte est fermée (part. pas.: la chose a été faite).  
Mia interpreto: (estinta partupon: la ago finiĝis, sed rezulto daŭras).

Por kelkaj momentoj la itistoj forgesis la koherecon de la lingvo Esperanto: tiu rimarko validas por la participoj, sed preteratente ili ĝin transportis al la aktiva simpla formo de la verbo. Aktivo kaj pasivo fofas la saman fakton, sed el apartaj fokusoj: dum aktivo fokusas la aganton, la pasivo fokusas la priagaton. Ĉiaj ceteraj cirkonstancoj pluas esence kaj potence ne nur egalaj, sed tute identaj. Sekve de tio, se aktiva frazo parolas pri ago, la pasiva nepre parolu pri ago. Ne temas pri gramatika eraro, sed pri logika: ago ne implicas postan rezulton, sed rezulto nepre implicas antaŭan agon...

Pro la senescepteco de Esperanto, se la esprimo *estas fermita* implicas, ke rezulto daŭras nun, la esprimo *estos fermita* nepre implicas, ke rezulto daŭros tiam.

Ni firme analizu la aktivan diron kun plena scienca honesteco:

Post unu jaro oni vendos la domon.

Kaj post atenta kaj prudenta rezonado, ni respondu al la sekvantaj demandoj [mi ĵuras, ke mi ne plu rimos]:

- Ĉu nun temas pri vendita domo?
- Ĉu nun temas pri vendata domo?
- Ĉu nun temas pri vendota domo?

La sola ĝusta respondo estas la sekvanta:

- Temas pri vendota domo.

Se la aktiva verboformo de la frazo parolas nenion pri venditeco, sed nur pri vendoteco, ankaŭ la pasiva formo ne devas paroli pri tio, kion la aktivo preterlasas [ĉiokaze venditeco], sed inkludi tion, kion la aktivo informas [ĉiokaze vendoteco]. Efektive, la itisma normo estas semantike kaj nature arbitra: la aktiva lasas ĉion al la hazardo kaj al la destino: estas multaj cirkonstancoj, kiuj povos malebligi tian vendon en la estonteco... Sed ne tio estas grava: grava estas la fakto, ke la pasivo ne redonas la tutan sencon de la aktivo, kaj reciproke la aktivo ne tute respondas al la senco de la pasivo.

Efektive, nenia verboformo simpla sinonimas al tia ŝajne pasiva esprimo. Kaj ĝuste tio klarigas la genion de Zamenhof, kiu en la 6-a regulo parolis nenion pri la estontaj participoj. Ili neniam respondas al la aktivaj simplaj verboformoj, dum la estantaj kaj la estintaj respondas, sed ne ĉiam.

Kaj Bertilo krome diras:

Laŭ itisto *li estis vundata* signifas, ke oni parolas pri longa vundado aŭ pri ripetata vundado, kaj tute ignoras la finon de la ago, kaj ties rezulton. Atisto tamen neas tion, kaj asertas, ke AT ne esprimas ion pri daŭro, sed nur esprimas la signifon *ĝuste tiam* (nek antaŭe, nek poste).

Laŭ atisto *li estis vundita* signifas, ke la vundado okazis iam antaŭe. Itisto kontraŭdiras, ke la ago tute bone povas esti io, kio okazis ĝuste tiam. Oni parolas pri la tuta ago inkluzive de ties plej grava parto, la rezultatingo, kaj oni esprimas tion per nomado de tiu lasta plej grava parto, la vunditeco.

Atistoj kaj itistoj maltrafas ambaŭ la veran sencon de la estanta participo: ne la participo indikas, ke difinita fakto daŭras aŭ ripetiĝas, sed la verboformo helpe de la cirkonstancoj de la fakto: arestito vundata de la karcerestro havas longan vundadon, sed homo vundata de kuglo havas momentan vundon. Konsistigas itisman malveran interpreton la penso, ke longa daŭro kaj ofteco de ago estas senco de la estanta

participo: tiaj daŭro kaj ofteco povas dependi de la propra verbo [*konstrui* kaj *instrui*, ekzemple] aŭ de la cirkonstancoj de la transsendata fakto [*alveno* de grava homo atendata de raportisto].

En la itisma frazo *li estis vundita* ne la participo, sed nur la verbo indikas, ke la fakto okazis antaŭ la momento de la parolo. Krome, ĉiu lingvano estas libera por elekti, kion li volas transmisii, kaj tio validas tutegale por estinta, estanta kaj estonta verbodormo:

- La pordo estis fermata, sed mi transŝoviĝis.

- La pordo estis fermita, kaj mi restis for.

## Ĉu neniu demandis Zamenhofon?

Zamĉjo helpas, sed li dormetas, kvankam tre malofte. Lia uzo de la esprimo *estos -ita* en la Biblio tre certe dependas de respekto al la Sankta Libro, kiun respekton etnolingvoj ŝajne ne montras...

Ni komencu per la Ekzercaro (24:10):

Kiam mia patro venos, diru al mi antaŭe la veron (aŭ estu dirinta al mi la veron)

Kaj ni daŭrigu per la tria libro Levidoj, XXIV:16, p. 60:

Kiu insultas la nomon de la Eternulo, estu mortigita; per ŝtonoj mortigu lin la tuta komunumo.

Se ni sekvas la Ekzercaron, la esprimo *estu -ita* indikas fakton antaŭan al alia: la diro antaŭ la veno kaj sekve la mortigo antaŭ la insulto...

Mi rekonas, ke tia uzo povas esti plene akceptinda stila rimedo, sed la ofta ripetado forrabas ĝian utilecon.

La reguloj de Beaufront taŭgas por nenio, ĉar li simple imitis la unuajn 14 frazojn de la paragrafo 25 de la Ekzercaro. Krome, ĉe la verbo "vesti", neniuj participoj formas ian pasivon kaj al neniu el ilia grupo respondas aktiva simpla formo. Tie aperas nur simpla adjektivo, kiun ni povus anstataŭigi per alia adjektivo, kiu havu difinitajn limojn:

*Mi estas vestita de du horoj. Mi estis vestita de du horoj. Mi estas certa, ke mi estos vestita du horojn pli frue, ol vi.*

Nenia diferenco inter la antaŭaj kaj la sekvantaj frazoj, kvankam nenia participo partoprenas ĉi tie, sed aliaj adjektivoj estus eblaj:

*Mi estas preta de du horoj. Mi estis preta de du horoj. Mi estas certa, ke mi estos preta du horojn pli frue, ol vi.*

Bedaŭrinde, neniuj rimarkas, ke la reguloj de Beaufront validas ne nur por participoj, sed ank aŭ por ĉiuj adjektivoj:

*Mi estas amata* kaj feliĉa (aktuale). *Mi estis amata* kaj feliĉa (tiam). *Mi estos amata* kaj feliĉa (en la tempo, pri kiu mi parolas aŭ pensas).

Cetere Beaufront diras nenion pri la estonta tempo, ĉar estinta, estanta aŭ estonta povas esti la tempo, pri kiu oni parolas aŭ pensas. Li povus elturniĝi tre facile: ... la tempo, kiun ĝis nun mi atendas.

## Kion instruas la Fundamento?

Denove Bertilo:

- Ĝenerale tiuj terminoj nomas la partupon per tempaj esprimoj rilataj al pasinteco, sed la Germana (fakte Latina) termino estas “perfekti”, kiu ne estas tempa termino, sed aspekta (= plenumita ago). Ke la partuponj enhavas tempan signifon, estas afero pri kiu konsentas atistoj kaj itistoj.

Miaj unuaj kritikoj celas ne nur Bertilon, sed precipe atistojn kaj itistojn. Perfekta tute ne estas plenumita, sed simple plene finita, kaj ĝuste pro tio mi difinas la estantan partupon per la esprimo *post la fakto*. Tiu vorto estas do bona difino de la estinta partupon, kiu indikas la finon de la ago [rompita: rompofino] kaj la finon de la stato [amita: amofino], kaj plej evidentas, ke rompofino estas plenumita ago, sed amofino neniel estas io plenumita...

La supraj vortoj de Bertilo klarigas, kial estas tiom da eraroj ĉe partuponj, ne nur la apudverbaj, sed precipe la solaj. Se la reguloj estas malĝustaj, ilia rutina apliko generas oftajn erarojn, de kiuj ne eskapas Bertilo mem, kiu lasas ie en sia klara kaj bonega teksto la sekvantan frazon:

Tiuj asertoj ŝajnas esti forte influitaj de tio...

Se *influi* estas havi influon, *influata* devas esti kun havata influo, sed *influita* devas esti kun havita influo, sekve ne plu kun havata influo, nome seninflua, ĉar postinflua.

Estas facile pruvi, ke partuponj ne indikas tempojn estantan, estantan kaj estontan, sed estas malfacile konvinki alian, eble ĉar parolata lingvo estas ia religio: nur la mia estas bona kaj digna, ĉar ĝi estas la sola vera...

Mia bonkora geleganto tamen saltu nenian linion, kaj estu tiel afabla por atente kompari linion post linio, ĉu ili enhavas nenion absurdan:

Mi rigardas al homo kantanta.	=	Mi rigardas al homo, kiu kantas.
Mi rigardis al homo kantanta.	=	Mi rigardis al homo, kiu kantis.
Mi rigardos al homo kantanta.	=	Mi rigardos al homo, kiu kantos.
Min ravas la himno kantata de li.	=	Min ravas la himno, kiun li kantas.
Min ravis la himno kantata de li.	=	Min ravis la himno, kiun li kantis.
Min ravis la himno kantata de li.	=	Min ravis la himno, kiun li kantos.
Enirinte, li sidiĝas.	=	Post kiam li eniras, li sidiĝas.
Enirinte, li sidiĝis.	=	Post kiam li eniris, li sidiĝis.
Enirinte, li sidiĝos.	=	Post kiam li eniros, li sidiĝos.

Mi estas jam pli ol sesdekjara esperantisto, kaj eĉ mia maligna inklino al eraroj ne sukcesas trovi ajnan inter la respondaj kolumnoj de la supra tabelo...

La eraroj devenas unuflanke de la Fundamenta Gramatiko kaj aliflanke de la reguloj, kiujn proponis la tiama prezidanto Johannes R. C. Isbrücker (1889-1967) en cirkulero disdonita dum la publika kunsido dum la okazanta [okazinta estus eraro] 45-a UK de Bruselo en 1960. Ege multaj blinde obeas ilin:

-anta	=	kiu -as	-ata	=	kiun (kion) oni -as
-inta	=	kiu -is	-ita	=	kiun (kion) oni -is
-onta	=	kiu -os	-ota	=	kiun (kion) oni -os

Mi varme esperas, ke miaj tri tripoj vere povos konvinki miajn gelegantojn pri la absurdo de la supraj aktivaj kaj pasivaj egaligoj, kiuj respondecas pri la konstantaj participaj eraroj de ege bonaj esperantistoj.

Alia paĝo kondukas nin al la diskuto pri la frazoj 23 kaj 24 de la 25-a paragrafo de la Ekzercaro:

Mi sciigas, ke de nun la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi.  
Estu trankvila, mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ.

Mi opinias, ke liaj argumentoj ne bone funkcias, ĉar estas eble singularigi la unuan frazon kaj pluraligi la duan, kaj la participoj restus la samaj. Krome du diversaj temoj aperas en tiuj frazoj: la unua parolas pri estonta nepago, dum la dua pri estonta kviteco. Nur la unua vere respondas al la aktiva formo: ... de nun mi ne pagos la ŝuldojn de mia filo. La dua respondas al io tute alia: ... baldaŭ mi estos paginta al vi mian tutan ŝuldon. Kaj la frazo sinonimas alian: ... baldaŭ mi estos kvita al vi je mia tuta ŝuldo.

Kaj mi nun antaŭpetas indulgan pardonon por mia impertinenteco aldoni, ke ne estas bone kompari jesajn kaj neajn frazojn, ĉar la nea havas sian sencon kondiĉitan al tiu de la jesaj: du neaj frazoj parolas ambaŭ pri ia nenio, sed ili ne sinonimas nur de tio, ke ili neas apartajn jesajn... Oni do prenu nur jesajn aŭ nur neajn...

Estus konvene relegi la paragrafon 24 de la Ekzercaro, kie ni vidas, ke la esprimo *estos -inta* indikas perfektan futuron, dum la formo *pagos* estas imperfekta futuro. Kaj tio validas ankaŭ por la esprimo *estos -ita*.

## La Zamenhofa verkaro

Mi sincere aplaŭdas la sekvantajn vortojn de Bertilo:

Zamenhof uzis pasivon dum sia tuta vivo en maniero, kiu perfekte kongruas kun la reguloj de aspektismo (itismo), kaj oni apenaŭ povas trovi frazojn, kiuj estas klarigeblaj nur per la principoj de tempismo (atismo).

Min tamen konsternas, ke li paradokse parolas ĉi-supre pri aspektoj kaj antaŭe sub la supra subtitolo pri tempoj:

- Ke la participoj enhavas tempan signifon, estas afero pri kiu konsentas atistoj kaj itistoj.

Tion mi tute ne komprenas, ĉar la lingva tempo rilatas al la momento de la parolo, al kies esprimoj ni ĉiam povas aldoni unu el la tempovortoj:

hieraŭ por la estintaj verboformoj: hieraŭ mi venis de la avo.

nun por la estantaj verboformoj: nun mi venas de la avo.  
morgaŭ por la estontaj verboformoj: morgaŭ mi venos de la avo.

Nenio tia okazas ĉe la participoj de tio, ke ĉiu el ili povas aperi flanke de estintaj, estantaj kaj estontaj verboformoj, kiel cetere restis pruvita en la komenco de la nuna referato, sed ripeto estas instrua:

Mi adoris bele vestitan virinon.  
Mi adoras bele vestitan virinon.  
Mi adoros bele vestitan virinon.

Se ni uzas la tempajn verboformojn, ni konstato, ke la participo konservas sian originan sencon en ĉiu el estintaj, estantaj kaj estontaj frazoj:

Mi adoris virinon, kiu sin bele vestis.  
Mi adoras virinon, kiu sin bele vestas.  
Mi adoros virinon, kiu sin bele vestos.

Kio do restas el la reguloj proponitaj de Isbrücker en Bruselo, kiuj tamen estas ĝis nun la gvidilo de plej nombraj esperantistoj?

La realan sencon de la participoj montras la sekvanta tabelo:

-anta	dum la fakto trudata de verba radikalo	luanta viro	dum la luo
-ata	dum la fakto trudata de verba radikalo	luata domo	dum la luo
-inta	post la fakto trudata de verba radikalo	luinta viro	post la luo
-ita	post la fakto trudata de verba radikalo	luita domo	post la luo
-onta	antaŭ la fakto trudata de verba radikalo	luonta viro	antaŭ la luo
-ota	antaŭ la fakto trudata de verba radikalo	luota domo	antaŭ la luo

Kaj por fini, mi pensas pri la sekvanta frazo:

Mi konstruos la domon kaj invitos tien miajn amikojn.

La responda pasivo por mi estus la sekvanta:

La domo estos konstruata kaj miaj amikoj estos tien invitataj.

Se tamen mi dirus, ke la domo estos konstruita kaj miaj amikoj estos invititaj, mi jam de nun ne bezonas plu ilin inviti: ili jam estas de nun invititaj...

Dixi.

Verkita en la 2008.02.13  
Ampleksigita en 2008.02.15